Revizio propono Statuto kaj Regularo de ILEI - enkonduko

La eventoj de la lastaj ses monatoj konfirmis tion, kion ni en la estraro kaj komitato konstatis tra la lastaj jaroj: la Statuto kaj Interna Regularo de ILEI bezonas modifojn je pluraj punktoj. La estraro en januaro 2011 komencis la revizian taskon, cele al aperigo de proponoj por la komitato antaŭ niaj kunsidoj en Kopenhago. Ni imagas havi tie kvorumon (trionon de la validaj komitatanoj) kaj konstatas (alineo 7.1.7), ke sufiĉas simpla plimulto por ŝanĝi kaj la Statuton kaj la Regularon. La nuna teksto estas legebla en la hejmpaĝo sub 'Dokumentoj>Statuto kaj Regularoj.

Por ne superŝuti komitatanojn tuj per tekstoj, la nuna mesaĝo celas resumi la motivojn por la ĉefaj ŝanĝoj. Kelkaj el tiuj estas de la komitato jam aprobitaj, sed ne enprenitaj; pliaj estis kolektitaj kaj akceptitaj de la estraro. En la nuna stadio ni ne volas doni detalajn motivigojn por la proponoj, tio povos sekvi, interalie kun reagoj al demandoj.

Akceptitaj decidoj:

La rotacia elektado de estraranoj (alineo 7.2.3) estis abolita en 2003, sed ne forstrekita.

La fakto, ke estraranoj kiuj ne estas samtempe sekciaj komitatanoj laŭofice fariĝas komitatanoj estis aldonita en 2004, sed mankas en nunaj vortumoj. Aldonenda.

La postulo por membreco de kandidata sekciestro en du jaroj antaŭ la peto fariĝis unu jaro antaŭ la peto-ektrakto (alineo 7.3.3.1). Akceptita en 2006, konfirmita en 2011.

La postulo por membreco de kandidata reprezentanto en la jaro antaŭ la peto fariĝis devo esti membro en la jaro de peto-ektrakto (alineo 7.3.4.1). Akceptita en 2006, konfirmita en 2011.

Precizigita en 2011, ke la kvin membroj bezonataj por fondi kaj reteni sekcion temas pri internaciaj membroj de ILEI; ne validas enlandaj membroj.

Precizigita en 2011, ke la trijara mandato por komitatanoj (alineo 7.1.2) finiĝu por ĉiuj komitatanoj en la 31a de marto de la jaro en kiu laŭplane okazos estrarelekto. Tiel nova komitato elektas la novan estraron. Necesas simila klarigo pri la komenco/fino de la trijara mandato de sekciestroj.

Novaj proponoj:

Trinivela strukturo

La revizio difinu trinivelan strukturon de dokumentoj por gvidi la ligon; suplemente al la nunaj Statuto (nivelo 1), la Interna Regularo kaj ceteraj regularoj (nivelo 2) aldoniĝu serio da Gvidiloj (nivelo 3) kiuj permesas kodigi konsilojn kaj detalojn, kiuj tro balastus la regularojn. La Statuto kaj Regularo restu sanĝeblaj nur de la komitato en fizikaj kunsidoj, la Gvidiloj estu starigitaj, modifitaj kaj nuligitaj de la estraro, sed ĉiu tia movo devas esti

akceptita per reta voĉdono de la komitato. Gvidiloj devas esti kaj resti publike afiŝataj (pluraj videblas en nia retejo ĉe ‘Dokumentoj > Gvidiloj).

Difino de ‘skriba’

La senkvoruma komitato en Matanzas plie interpretis la statutajn citojn pri la neceso por "skribaj" dokumentoj. La komitato akceptis ke ankau elektronikaj dokumentoj estas "skribaj" au "skribitaj", kaj ili estu akceptataj, kondiche je sufiĉaj protektoj por certigi la identecon de la sendintoj. Tiun punkton ni ne voĉdonigis ĉe la tuta komitato en januaro 2011, sekve, ĝi aldoniĝas al la punktoj por la statuta reverko.

Orda registrado de ŝanĝoj

La malfacileco kunrasti ĉiujn akceptitajn regular-ŝanĝojn pelas nin enkorpigi en la dokumento mem la devon noti kaj publikigi registron de ĉiuj ŝanĝoj. La protokoloj de multaj komitatkunsidoj tra la lastaj 15 jaroj mankas. Nur Lovran (2001) kaj Kaunas (2005) estas trovitaj kaj aperigitaj en nia retejo.

Individuaj membroj

La nuna Statuto/regularo postulas, ke individuaj membroj estas nur tiuj en landoj sen sekcioj. Neniu alia aliro eblas. Ekzemple, tio preskaŭ malebligus al ILEI akcepti membriĝojn en UK kaj aliaj aranĝoj. Tio estas malrealisma kaj de almenaŭ dudek jaroj ne praktikata. Ni havas plurajn membrojn en landoj kun sekcioj, kiuj pro unu kialo aŭ alia, aliĝas rekte al ILEI. **Propono de la estraro:** individuaj membroj estas tiuj, kiuj ne aliĝas pere de sekcio. Ni anoncu regulare, ke la kutima kaj rekomendata vojo estas ja membriĝi tra sekcio se ekzistas, sed tio ne estu deviga! Nia nova membro-administra skemo garantias, ke sekciestroj sciu pri ĉiu membro en sia teritorio.

Konsistigo de la Komitato

La nuna Statuto/regularo postulas, ke ne nur la sekciaj membroj, sed ankaŭ la individuaj membroj elektas komitatanojn. Denove, komitatanoj por individuaj membroj neniam ekzistis (almenaŭ tra la lastaj dudek jaroj). La regularo indikas, ke la sekretario devas organizi tiajn nomigojn, sed tio estas organize peza. UEA havas similan meĥanismon, sed ĉe ili la nombroj estas multe pli grandaj kaj UEA havas Centran Oficejon por organizi tion. **Propono de la estraro:** por simpligi nian administradon kaj elstarigi la rolon de la sekcioj, nur sekcioj nomu komitatanojn.

Alternativa propono: (facile administrebla): La komitato en la jaro kiam nova komitato ekdeĵoras, elektas dum fizika kunsido nombron da ‘Individuaj komitatanoj’, t.e. komitatanoj, kiuj estas individuaj membroj, kiuj portas al la komitato apartan ekspertizon aŭ valoron. La nombro de Individuaj komitatanoj estu unu por ĉiu kompleta deko de validaj sekciaj komitatanoj. Ĉiu ILEI-membro rajtas proponi individuajn komitatanojn. (Praktike, tio permesos la aldonon de kvin individuaj komitatanoj – kio ja altigos la kvorumpostulon)

Enlandaj kaj internaciaj membroj

La nuna statuto kaj regularo sugestas, ke ĉiu enlanda membro de sekcio estas devige internacia membro. Tio estas evidente dezirinda, sed malrealisma. Kelkaj sekcioj havas

multajn enlandajn membrojn, kiuj volas resti nur enlandaj membroj. Teorie, ret-membreco devus proponi manieron allogi tiujn membrojn, sed ne ĉiam okazas. La reviziita regularo devas agnoski tiun realecon, eĉ se ni ne ŝatas ĝin. Multaj sekcioj devigas inkluzivi internacian membrecon, kaj ni, se eble regulare, kuraĝigu tion.

Kvorumpostuloj

Necesas fiksi kvorumpostulon por retaj voĉdonoj de la Komitato. Ideale, tio devus esti pli severa ol por fizike ĉeestaj sesioj (triono). Sed post konstato de la modestega reago al la ĵus fininta fizikpoŝta voĉdono (eĉ ne duono), ni devas konstati ke fikso de pli kredinda postulo (ekzemple duono) povus okazi nur post signifa vigligo de la komitatanoj kaj sekcioj en la realigo de siaj demokrataj rajtoj kaj devoj. Similkiale, ni hezitas proponi pli altajn postulojn por ŝanĝoj de la Statuto (diference de la Interna Regularo). Ne ekzistas estrara propono pri ĉi tio.

Eksigo de membroj, reprezentantoj, sekciestroj, sekcioj

En la nuna Statuto/regularo ekzistas diversaj reguloj por la diversaj kazoj. Nur la Komitato rajtas eksigi sekcion. Personoj eksigas sin post unujara nepago de kotizo, kaj pere de tio perdas la rajton je siaj eventualaj oficoj. Mankas ĝenerala protekto, kiun necesas starigi: intenco malnomi aŭ eksigi membron aŭ oficanton aŭ sekcion povas okazi nur post trimonata averto sendita al la koncernato, kopie al la tuta estraro.

Protektoj okaze de ofic-ĉeso

Prudentas aldoni al la regularo devigon al ĉiu oficanto, ke kaze de ofic-ĉeso pro ajna kialo, tiu orde, komplete kaj senprokraste transdonu la dokumentojn kaj datumojn ligitaj al la ofico al la posteulo aŭ la estraro.

Precizigoj pri la konsistigo kaj funkciado de la komitato

La regulara teksto sub alineo 7.1.2 bezonas detalan studon kaj revortumon. Necesas klarigi kiel povas okazi anstataŭado, la rajto de unu komitatano porti pli ol unu voĉo, kaj pliaj demandoj. Temo por detaligo kaze de konkreta teksto-propono.

Rotacia devigo por la kontrol-komisiono

Ni trovis rotacion malpraktika por internacia estraro. Simile malpraktika kaj administre peza estas alineo 7.1.7 pri rotacio de membroj de la Kontrola Komisiono prui Financoj. Tiu rotacio neniam estis plenumita. Fake kvalifikitaj homoj malfacile troveblas, kaj en tiu ofico stabileco esencas. Ĉiujara komitata elektado malpraktikas en la nuna epoko kun la plimulto de konferencoj ekstereŭropaj kaj komitate senkvorumaj.

Membro-administrado

Alineo 7.2.2.2 (malsufiĉe) listigas la laŭstatutajn taskojn de la sekretario. Mirige, la plej grava tasko el ĉiuj -- la membro-administrado – nenie en la tuta Statuto/regularo estas menciita. La estraro proponas aldoni mencion de tiu esenca laboro, sed konservu la nunan staton, ke tiu tasko ne nepre devas esti plenumata de la sekretario. Tio donas bonvenan flekseblecon, en tempo kiam ILEI moviĝas al limigita uzo de honorariataj

laborfortoj. La revizio devas precizigi la alineojn, kiuj priskribas la alprenon de tiaj laborfortoj.

Adaptiĝo al la reta epoko

Plurloke necesas modernigi la Statuton/regularon por enkorpigi la novajn retajn eblojn. Ekzemple la biblecaj mencioj pri 40-tagaj reagotempoj estas revortumendaj. La rolo de retaj voĉdonoj devas esti notita, la trimonata devigo antaŭanonci temojn por komitatkunsidoj ne plu pravigeblas – sed antaŭanoncitaj temoj ricevos prioritaton super malfrue aŭ surloke anoncitaj temoj.

Ene de kelkaj semajnoj, ni esperas aperigi por komitatanoj detalajn proponojn por revortumoj de la tekstoj. Esencas, ke la ĉefa parto de la debato okazu rete (ekzemple tra la komitata retgrupo) tra la venontaj monatoj, tiel ke ni alvenu en Kopenhago kun multaj punktoj jam primaĉitaj kaj solvitaj. Ĉi tiu interna reorganizo estas ege tempo-postula, sed nia estonta kresko kaj ekstereniro devas baziĝi je firma kaj funkcianta interna bazo. Kiel invitis antaŭ tridek jaroj la varbiloj de UEA: “Konstruu kun ni!”

Kore

La estraro de ILEI. Budapeŝto, la 25an de aprilo, 2011.